



# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Otakar Batlička (1895 – 1942), ĉeĥa Jack London

**Prelegonto:** Oldřich Arnošt Fischer

En januaro 1939 alvenis en redakcion de la ĵurnalo Mladý hlasatel (Juna Heroldo) grizethara, altstatura, iomete korpulenta viro. Evidente oficisto. Neniu lin rigardus la aventuristo, kiu jam travivis pli multe ol kiu ajn el liaj samaĝuloj. Sed li estas bonega rakontanto! La 28-an de januaro 1939 oni en Mladý hlasatel publikis lian la unuan rakonton „Ni vokas Hurst-on, ni vokas Hurst-on!“ Dum ne plenaj tri jaroj li verkis pli ol 150 rakontoj. Li ilin verkis hastante, kvazaŭ li sciis, ke al li restas nur malmulte da vivtempo. Ja tiam li estis telegrafisto de rezista kontraŭnazia grupo Obrana národa (Defendo de la Nacio)! Otakar Batlička, la verkisto, kiu per siaj altiraj aventuraj rakontoj influis multe da junaj homoj, dum socialismo estis preskaŭ forgesita. Poste oni pri li elpensis multe da legendoj. Sed kia li vere estis?

Ĉeesta programo. Estas registrita.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 5-an de aprilo 2022 je la 18-a h.

**Kie:** Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavská (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



## Cetera programo en aprilo

La 12-an **Homa cerbo kaj esploroj de atentemo kaj memoro** – Josef Vojáček. Rete per Skajpo

La 19-an **Refleksivaj pronomoj** – Milan Kolka, ekzercoj. Občanský klub, Hybešova 65a

La 26-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

## Programo en majo

La 3-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Občanský klub, Hybešova 65a

La 10-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

La 17-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Občanský klub, Hybešova 65a

La 24-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

La 31-an **Historio de Ukrainio** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

**Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de aprilo kaj por majo.** Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



## Ni rekomendas

- **NOVE!** Trapasu **KER ekzamenon** rete. Pli da informojn vi povas legi en Edukado.net ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=869>. Se vi interesiĝas pri la ekzameno, la ekzamkomisio petas vin, ke vi plenumu la enketilon ĉe <https://forms.gle/...4sagZvaeXoY9>. UEA agnoskas novajn retajn ekzamenojn.

- **NOVE!** Ekde septembro Adam Mickiewicz Univiersitato en Poznano planas lanĉi novan tipon de studado. Temas pri du jara ĉeesta **magistra studado**, fako **Interlingvistiko** kadre de Lingvistiko kaj informmanaĝado. La studadoj estos en la angla kaj en Esperanto (ambaŭ lingvoj bezonataj). Por pli da informoj bonvolu kontakti prof. Iлона Koutny ([ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl))
- **NOVE!** Por ke ni bone regu nian lingvon, ni bezonas uzi ĝin. Unu eblo de uzo estas legado de esperanta literaturo. Bedaŭrinde pro sendokostoj homoj preskaŭ ne aĉetas alilandan E-literaturon. Nia klubo povas al vi peri aĉeton de libroj el **Bjalistoka e-butiko**. Rigradu en [ilian retpaĝaron](#). Se vi tie trovos ion, kin vi volas, bonvolu skribu al mi. Kondiĉoj: al kosto estos kosto de la libroj (eble mi recovos rabaton) + kontribuo al internacia sendokostoj + 20 Kč por la klubo + sendokostoj en Ĉeĥio. Eblas sendi per Česká pošta, Zásilkovna kaj transdoni en la klubejo (sen sendokosto). Baldaŭ en la stoko aperos nova eldono de **Vojaĝo al Kazohinio** de Sándor Szathmári. En ilia stoko estas haveblaj ankaŭ novaj eldonoj de verkoj de **Julio Baghy**. Se vi hezitas, ĉu aĉeti, ni citu Tomasz Chmielik: “Aĉetu verdajn librojn, eĉ se vi ne volas legi ĝin.” Sed prefere aĉetu kaj legu. Nur tial vi povas daŭrigi eldonadon de esperanta literaturo.
- Vizitu [Arbaristan Panteonon](#), belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice
- **Instruado de Esperanto en Bartošovice okazonta komence de aprilo estis nuligita.**



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo ([https://eventaservo.org/o/EO\\_Brna](https://eventaservo.org/o/EO_Brna))

Milan Kolka  
prezidanto